

- ★ Strategioj por lerni fremdajn lingvojn (fino) / 2
- ★ Kongreso pri interkulturo, komunikado kaj identeco / 2
- ★ Tra la spuroj de niaj klasikuloj: Kalocsay / 3
- ★ Precizigoj pri nia historio / 3
- ★ Informilo n-ro 3 / 4

Sukcesa kaj promesplena Orienta Esperanto-Renkontiĝo en Granma

De la 22-a ĝis la 25-a de septembro okazis, ĉirkaŭ belega naturo rande de Ĉenmontaro Maestra, en la Kampadejo Salto de Jibacoa (Manzanillo, Granma) E-Renkontiĝo de la Orienta Regiono kun 45 partoprenantoj el kvin kubaj provincoj (Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma, Villa Clara kaj Havano). Tie, malgraŭ manko de kelkaj tradiciaj eroj, kaj troa vespera abunda pluvego, la organizantoj ja zorgis pri enhave suka evento.

Gonzalo Collantes García (Santiago de Cuba), Prezidanto de la Kuba Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), respondecis pri la instruista trejnado kaj provizis la partoprenintojn per abunda materialo rilate didaktikon kaj metodikon. Sukcese trapasis la instruistan ekzamenon 11 partoprenantoj. Javier Ramos Nistal (Havano) kune kun Gonzalo, gvidis kurson por komencantoj, dum kiu amuziĝo ne mankis. D-ro Wilfredo Díaz Hernández (Granma), prezidanto de la Klubo Martí-Zamenhof prelegis pri la idearo de Martí kaj la humanismo de Zamenhof; Alberto F. Calienes (Havano) prezentis la diskuttemon “Esperanto, fenestro al la mondo. Kion fari post la kurso?” surbaze de personaj spertoj. Aparte interesa estis la programero Interŝanĝo kun la prezidanto de KEA, kiu komenciĝis tuj post la vespermanĝo kaj finiĝis noktomeze pro la multaj demandoj, opinioj kaj kolektiva deziro plibonigi la agadon de nia Asocio.

Antaŭ nia alveno ni estis informitaj pri la bona rezulto dum la ĉijara inspekto de la Ministerio pri Justico. Ni havis inviton partopreni kunsidon de la loka estraro kun reprezentantoj de tiu ministrejo kaj de la Provinca Direkcio pri Kulturo, kiu okazis la 22-an atm. Tie ni havis okazon aŭskulti de la lokaj aŭtoritatoj laŭdon al la plurjara laboro de nia tiea filio kaj kune kun ili, ni insistis pri la bezono havi moralan subtenon por pli efike plenumi nian laboron. Ni certas, ke tiu kunsido signos novan etapon por Esperanto en la provinco.

Gratulon al Frank Michel Cedeño Estrada, Anyer Montero Ramos, Yainier Rodríguez Fonseca, estraranoj de la filio de KEA en Granma kaj al Rafael Cabrera Espinosa, Komisiito por la Orienta Regiono.

ALBERTO FERNÁNDEZ-CALIENES BARRIOS



Supre, Gonzalo Collantes García, prezidanto de la Kuba ILEI-Sekcio, dum la Instruista Trejnado; malsupre, 11 sukcesintoj el 5 provincoj, nova generacio de E-instruistoj. Fotoj: KEA.

Strategioj por lerni fremdajn lingvojn (*fina parto*)

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

Memoru, ke esplori plej bonajn manierojn, agojn lerni lingvon kaj kundividi spertojn kaj travivaĵojn tiurilate kun novaj kolegoj kaj lernantoj estu daŭra tasko de plej spertaj E-instruantoj kaj instruistoj.

Por plibonigi la prononcon, la aŭtoro rekomendas la jenajn agojn: ★ aŭskultado kaj reaŭskultado de surbendigitaj materialoj por asimili kaj multe pli konatiĝi kun la diversaj sonoj, intonacioj kaj ritmoj, ripetado de frazoj post modela eldiro por fiksi prononcon, intonacion kaj ritmon; ★ praktiko de laŭtlegado de frazoj kaj alineoj kaj registro de la laŭtlegado por poste sinaŭskulti aŭ por ke alia persono aŭskultu la lernanton por kontroli, kiel li/ŝi prononcas kaj intonacias, kiel vi sonas. Tiel iom post iom oni atingas la ĝustan prononcon de la diversaj sonoj, la intonacion, la akcenton, la ritmon kaj la kunligon de vortoj; ★ daŭra fonetika transskribado de vortoj, por pli konsciigi pri ilia prononco kiam temas pri lingvoj kiel la angla, kies sonoj havas diversajn skribmanierojn, grafemojn; ★ fari ekzercojn kaj ludojn, kie oni devas identigi sonojn, reprodukti ilin aŭ esprimi vortojn per ili.

Oni devas priatenti la fakton, ke aŭskultado kaj reaŭskultado de registritaj materialoj ebligas asimili kaj multe pli konatiĝi kun la diversaj sonoj, ritmoj kaj intonacioj.

Por pliriĉigi la vortrezoron en la nova lingvo, ni rekomendas la jenajn agadojn: ★ legado kaj relegado de pluraj tekstotipoj por familiariĝi kaj pliriĉigi la vortprovizon pri diversaj temoj. Oni ankaŭ povas legi ŝatatajn temojn, tiel ke la legado ankaŭ estu ĝojplena; ★ legado kaj relegado de lernolibroj kaj ekzercaroj. (La fakto, ke oni finas la studadon de lernolibro dum kurso, ne signifas, ke oni devas entirkestigi ĝin por ne plu malfermi ĝin. Oni devas konsideri la fakton, ke ju pli oni progresas, des pli oni povas kompreni la lingvistikan strukturon kaj komunikan enhavon de relegata teksto); ★ legado por pliriĉigi la vortrezoron, kiam vi skribas ĉiujn novajn vortojn kaj poste serĉas ilin en dulingva aŭ unulingva vortaro laŭ via lingvoprogreso. Vi nepre devas skribi frazojn per tiuj vortoj, por multe pli fiksi ilin kaj poste de tempo al tempo vi revidu ilin por eviti forgesemon; ★ kompili personan vortaron, kie vi notas ĉiujn novajn vortojn, parolturnojn kaj konversaciajn esprimojn, kiujn vi legas aŭ aŭskultas dum via konstanta alproksimiĝo al la lingvo; ★ skribu tuj surpapere vortojn, parolturnojn aŭ aliajn lingvaĵojn kiujn vi aŭskultas aŭ legas en la lernejo, sur la strato aŭ aliloke, por poste serĉi ilin en vortaro kaj noti ilin en speciala vortarkajero; ★ skribi la novajn

vortojn de la semajno sur iu papero, kiun vi metos en tiu loko de via hejmo aŭ laborejo kie vi plej multe restas, tiel ke vi havu la ŝancon ofte vidi ilin, kio helpos vin aldoni ilin al via vortrezoro; ★ konatiĝi kun la vortelementoj kaj la kunmetaĵoj de la nova lingvo (prefiksoj, sufiksoj, kunmetitaj vortoj, ktp.), kio ebligas rekonon kaj aplikon de derivitaj kaj kunmetitaj vortoj en diversaj kuntekstoj surbaze de la identigo kaj posedo de radikoj kaj leksikaj kaj gramatikaj morfemoj; ★ daŭre esprimi kaj skribi informojn aŭ faktojn per vortoj, frazoj aŭ esprimoj tuj post ties aŭskultado kaj legado; ★ fari ludojn, pere de kiuj oni povas menciigi vortojn de la sama familio, elimini vortojn, kiuj ne rilatas al la grupo, fari frazojn per vortoj, ripeti vortojn antaŭe esprimatajn kaj aldoni plian, diveni vortojn, esprimi vortojn rilatantajn al temo aŭ situacio, ktp;

Por scipovi la diversajn gramatikaĵojn, ni rekomendas fari la jenon: ★ fari plurajn kaj variajn gramatikekzercojn, kiuj estas en libroj kaj ekzercaroj post la studo de la koncernaj gramatikreguloj, kiuj ebligas la esprimon de la diversaj komunikaj funkcioj. La plenumo de tiuj ekzercoj ebligas la evoluon de gramatikaj, leksikaj kaj fonetikaj aŭtomatoj, kio helpas al vi esprimi vin ekzakte kaj flue; ★ fari ludojn, kie vi devas uzi la gramatikajn regulojn lernitajn, ekzemple, esprimi pasintan tempon, esprimi pasintajn kutimojn, esprimi futuron, ktp.

Ni emfazas, ke paroli estas produktiva kapablo, kiu postulas daŭran ekzercadon, por scipovi tuj reagi flue, kohera kaj ekzakte al nia alparolinto.

Kongreso pri interkulturo, komunikado kaj identeco

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

De la 12-a ĝis la 14-a de septembro mi partoprenis la Unuan Internacian Kongreson pri Interkulturo, Komunikado kaj Identeco, kiun kune organizis la ekvadora Centro Internacia de Supera Edukado por Latinameriko (CIESPAL), la Universitato La Frontera (Ĉilio) kaj la Societo Latinamerika de Interkulturaj Studoj (SoLEI).

La kongreso sesiis ĉe CIESPAL kaj ĝin partoprenis ĉirkaŭ 500 akademianoj, universitatoj, komunikistoj, ĵurnalistoj kaj reprezentantoj de originaj popoloj de la regiono kaj aliaj neregistaraj institucioj el 16 landoj.

Dum la kongreso prezentiĝis pli ol 200 prelegoj en labortabloj dividitaj laŭ 9 temaj

aksoj, plus 6 magistras prelegoj, forumo de SoLEI, kiu konsistas el reto de fakuloj kaj studemuloj pri interkulturo en la regiono kaj pri ĝi.

SoLEI alvokis la kongresanojn aliĝi kaj kunlabori pri tiu ĉi agado. Nome de Univerŝala Esperanto-Asocio (UEA) mi raportis pri la Asocio kaj esprimis la malfermitecon de UEA al kunlaboro kun SoLEI tiel ke ĝiaj celoj kongruas kun nia mondovizio pri lingva kaj kultura diverseco, protektado al minoritataj lingvoj kaj kulturoj.

Nome de UEA kaj kiel kunordiganto de ties Komisiono por Ameriko, kaj danke al ties financa subteno kaj tre speciale al Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA (CED), mi partoprenis tiun ĉi kongreson kiel preleganto.

Same kiel pasintjare en Salvadoro, kadre de la Amerikanista Kongreso, du meksikaj esperantistoj, profesoroj de la renomata Universitato de Puebla, partoprenis la kongreson, temis pri Iván Deance kaj Verónica Vázquez.

Mi prelegis pri “La identeco en interkultura kunteksto: lingva alternativo ekde propedeŭtika vidpunkto”.

Ĝin mi prezentis kadre de la tema akso n-ro 5 “Komunikaj strategioj de lokaj komunumoj kaj teritoriaj agadoj”. En tiu ĉi prelego mi prezentis analizon pri la konstruo de kolektiva identeco en komunumo teritorie disa, sed ligita per komuna lingvo, kaj mi same proksimiĝis al la rolo de la lingvo en tiu ĉi procezo.

Estis ege interesa kaj bona sperto prezenti Esperanton ekster la asociaj rondoj, en internacia scienca evento, kiu esploras la temaron de interkulturo, komunikado kaj identeco. Sendube, atentinda agadkampoj kiu valorigas la laboron de la Esperanto-komunumo tra la mondo.

Tra la spuroj de niaj klasikuloj

Kálmán Kalocsay

Kalocsay [pr. káloĉaj] estas elstara verkistoj kaj poeto de nia lingvo. Ĉefredaktoro de *Literatura Mondo* en ĝiaj tri periodoj; spirita gvidanto de la Budapeŝta Skolo. Medicinisto (infektologo). Titolita universitata profesoro. Doktoro de la medicina scienco. Li naskiĝis la 6-an de oktobro 1891 en Abaújszántó. Lia patro d-ro Kálmán Kalocsay estis tribunala juĝisto, lia patrino Jolán Panda mortis junaĝe en 1893.

Pro siaj meritoj en la medicina laboro Kalocsay ricevis kvar ŝtatajn distingojn. En 1929 li edziĝis al Margit Vangel.

Lia E-kariero komenciĝis en 1911. Ekkonante Esperanton li dediĉis sian talenton al la ideo de la zamenhofa lingvo kaj ĝismorte estis ĝia senlaca kultivanto. Kiel poeto, fide-la tradukisto, eseisto, redaktoro, lingvisto, gramatikisto, perfekta konanto de la spirito de Esperanto, Kálmán Kalocsay jam en sia vivo ricevis plenan rekonon de la E-mondo.

Liaj ĉefaj verkoj originalaj estas *Mondo kaj Koro* (poemoj, 1921); *Rimportretoj* (rondelformaj poemoj, kiuj trafe karakterizas 58 famajn esperantistojn, 1931); kaj *Streĉita Kordo* konsiderata de la fakuloj kiel mejloŝtono de la E-poezio, 1931. Li prilaboris la ĝis tiam mankantan E-prozodion kaj per tio malfermiĝis nova horizonto en la Esperanta liriko. Al kelkaj poemoj Kalocsay mem komponis melodion. 52 poemoj de Kalocsay estas tradukitaj al 13 lingvoj.

Inter la poemtradukoj menciindas *Kantanta Kamparo* (101 popolkantoj, 1921); kaj *Eterna Bukedo* (traduko el 22 lingvoj, 1931); aliaj tradukverkoj estas *La tragedio de l' homo* de Madách (ĉefverko de la hungara literaturo, 1924, reviziita eldono 1965); tri Shakespeare-verkoj: *Reĝo Lear* (1966);



Somermeznoĝa Sonĝo (1967); *La Tempesto* (1970).

Li abunde kreis ankaŭ lingvistikajn verkojn tre konatajn kiel *Lingvo*, *Stilo*, *Formo* (1931); *Parnasa Gvidlibro* (kun Waringhien kaj R. Bernard, 1932, reviziita kaj kompletigita eldono 1968); kaj *Plena Gramatiko de Esperanto* (kun G. Waringhien, 1938, 1958-1964), interalie.

Multaj aliaj verkoj estis kreitaj de Kalocsay, ankaŭ tradukoj poemaj kaj prozaj. Li ankaŭ plenumis multajn aktivulajn rolojn en la Hungarlanda E-Societo, kiun li prezidis inter 1938 kaj 1941, kaj poste iĝis ĝia honora prezidanto. Membro de la Lingva Komitato 1922-48; membro de la Akademio de Esperanto 1949-76. Li ricevis plurajn distingojn pri kulturo. Honormedalo de Hungara PEN-Klubo 1970. Ordeno de Laboro, ora grado 1971. Honora membro de UEA. Pro Esperanto 1983 (postmorte).

Li mortis la 27-an de februaro 1976. Lia cindro estas lokita en la familia kripto en la urbeto Máriabesnyő. Krom lia giganta verkaro, strato en Abaújszántó kaj en Miskolc, du memortabuloj en Máriabesnyő, Efonto en Nagybakónak, en la naskiĝurbeto Memor-ĉambro kaj publika bronza busto anoncas la nomon de Kálmán Kalocsay.

El lia poemaro *Izolo*, jen la poemo “Se vi koleras”.

Se vi koleras,
Mi ĝin toleras,
Revante pri l' feliĉo
De l' repaciĝo.

Sur dolĉa pluŝo
De l' paŭta buŝo
Mi serĉas, por surprizo,
Lokon de kiso.

Nervoza svingo
De l' brak' en ringo
Fermiĝos por haveno
De ĉirkaŭpreno.

La akvo varma
De l' guto larma
Per gusto min regalos:
La lipojn salos.

Ĉar ja, sen dubo,
Post ŝtorm' kaj nubo
Plu velos nia barko
Sub ĉielarko

De via rido,
Kiu, por gvido,
Albrilos tra l' nebuloj
De la okuloj.

Kaj kiu pravas?
Ĉu tio gravas?
La am' – jen sur la tero
La sola vero!

Precizigoj pri nia historio

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

Sur paĝo 25 de *El Esperanto en Cuba (1904-1973)*, mi diras ke, en Santiago de Cuba, la 18-an de oktobro 1908, fondiĝas Kuba Esperanta Societo (KES) – la unua tutlanda E-asocio en Kubo, sub la gvido de d-ro Pedro Pablo Valiente; kaj mi aldonas ke, la 16-an de decembro samjare, d-ro Fernando Ortiz, en la loka ĵurnalo *Diario Español*, diskonigi informon pri tio titolitan «Sociedad Esperantista» (p. 2, laŭ Araceli García Carranza, en *Biobibliografía del Dr. Fernando*

Ortiz, p. 132). Iom post la eldono de la unua volumo de nia historio, aperis *Las noticias de la historia, 1902-1958 (Crónicas de Santiago de Cuba)*, de Alcibiades Poveda Díaz, kaj tie nia kara amiko Gonzalo Collantes trovis interesan informon sur paĝo 60, kiu rimarkas ke, laŭ la ĵurnalo *El Cubano Libre* (Santiago de Cuba, 8-an de decembro 1908), en la domo de d-ro Luis Espín, oni kreis, provizore, grupon nomitan Sociedad Esperantista Cubana, taksita kiel “la unua el tiu tipo en la insulo”, kaj tio meritas kelkajn precizigojn:

Sendube, temas pri esperanta institucio ne trovita de ni antaŭe. Tio kion subtekis *El Cubano Libre*, rilate al “la unua

el tiu tipo en la insulo” ne estas vero, ĉar ni havas sufiĉajn informojn kiuj permesas argumenti ke la unua en nia lando estis KES, fondita, kiel jam dirite, la 18-an de oktobro 1908, ĉe Calvario A-4, kie ekde 2008 troviĝas memortabulo, omaĝe al ĝia centjariĝo.

Tute alia afero estas tio kion mi diris rilate la informon de d-ro Ortiz. Sciante la novan konitaĵon de Alcibiades Poveda, certe mi devas rekonsideri la ideon. La informo de Ortiz (16-12-1908) ne temis pri la fondiĝo de KES (18-10-1908), sed pri tiu de Sociedad Esperantista Cubana (05-12-1908), afero kiun li diskonigis sub la titolo «Sociedad Esperantista».

INFORMILO n-ro 3 DE LA NACIA SIDEJO (ĝis 2016-10-20)**MEMBROJ-SUBTENANTOJ 2016**

★ **La Habana (35):** Ángela María Pedroso Cuesta, Onoermis Acuña Velázquez, Alberto Rodríguez Pineda, Noel González Fernández, Luis Enrique Rizo García, Oscar Asensio Pisciotta, Yordán Fonseca Olivera, Marta Eugenia Alonso Gutiérrez, Ismary Lezcano García, Digna Mayra Morales Burón, Alberto Fernández-Calienes Barrios, Javier Ramos Nistal, Olga Lidia Barrios Cunningham, María Antonia Cartaya Martínez, José Luis Hernández Carvajal, Miguel Ángel González Alfonso, Daimi Doval Delsa, José Cárdenas Zúñiga, Juan Carlos Montero Medina, Vilhelmo Lutermano, Julián Hernández Angulo, Magaly Valdés Serrú, Elmer Loes Matos, Pedro Fernández Rodríguez, Maritza Gutiérrez González, Ariadna García Gutiérrez, Alejandro García Acosta, Frank González González, Geomar Martínez Pérez, Mabel Blanco de la Cruz, Héctor Jiménez Batista, Blanca Julia Gómez, Juan Ramón Rodríguez Gómez, Alina Miranda Busu-

til, Teresa Cepero Tejera. ★ **Mayabeque (1):** Yuniór Benítez Alonso. ★ **Villa Clara (6):** José Luis Montes de Oca Cárdenas, Julio César Díaz Casañas, Leonides López Morales, Yusimith Barrera Camacho, Eddy Machado Hernández, Raicel García Pérez. ★ **Sancti Spíritus (1):** Yoandra Rodríguez Labrada. ★ **Ciego de Ávila (1):** Amparado Cisneroviro. ★ **Santiago de Cuba (5):** Julio César Tamayo Salas, Pablo Cabrera Toledano, Guillermo Navarro Toledano, Carlos R. Lolo Mendoza, Francés Guibert Sorzano. ★ **Guantánamo (5):** Leonardo Luna Neyra, Tania Laurencio Molina, Tirso Ávila Bory, Asiel Torres Laurencio, Iliagne Torres Jardines.

DONACOJ (en CUP)

★ **Martí-Klubo (480.00):** Vilhelmo Lutermano (480.00); ★ **Kuba Esperantista Junulara Organizo (384.00):** Vilhelmo Lutermano (384.00); ★ **Fonduso Instruado (2 159.00):** Alberto Fernández-Calienes Barrios (48.00), Diana González Padilla (192.00),

Alberto Rodríguez Pineda (480.00), Ángela María Pedroso Cuesta (100.00), Magaly Valdés Serrú (192.00), Reina Doncel Meneses (192.00), Javier Ramos Nistal (120.00), George León Rodríguez (120.00), Joan Fernández Valentín (120.00), María Antonia Cartaya Martínez (120.00), María de los Ángeles López Báez (192.00), Olga Lidia Barrios Cunningham (50.00). ★ **Ĝenerala Kaso (25.00):** Yuniór Benítez Alonso (25.00). ★ **Fonduso Solidareco (3 720.00):** Vilhelmo Lutermano (1 200.00), Reina Doncel Meneses (120.00), María de los Ángeles López Báez (120.00), Gisela de la Caridad Docampo Alba (120.00), Magaly Valdés Serrú (120.00), Juan Ramón Rodríguez Gómez (120.00), Diana Margarita González Padilla (120.00), Julián Hernández Angulo (120.00), Damaris Hernández García (120.00), Alberto Rodríguez Pineda (1 440.00), Alberto Fernández-Calienes Barrios (120.00). ★ **Aŭkcio okaze de la 37-a Datreveno de KEA (233.00).**

Al ĉiuj KEA tre kore dankas.

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.cu.cu
www.esperanto.cu/cu



Kuba Esperanto-Renkontiĝo 2017
Kampadejo Dos Hermanas
Viñales, Pinar del Río
14-19 marto 2017

**Gratulon
en la
55-a Datreveno!**

www.radiohc.cu/eo



RADIO HAVANO KUBO

Kurtondaj kaj retaj elsendoj en Esperanto

Nun ankaŭ en cifereca radio kaj en 102,5 FM!

esperanto.cu estas trimonata bulteno sendata al komitatanoj, estraranoj, aktivuloj kaj membroj-subtenantoj de Kuba Esperanto-Asocio. PDF-versio elŝuteblas. **Kunredaktis:** Maritza Gutiérrez kaj Alberto F. Calienes. **Enpaĝigis:** Alberto F. Calienes.